烏之賦

LA NOTO PRI KORVOJ

La birdo havas diferencajn nomojn depende de grandeco. La malgranda nomiĝas pigo, kaj la granda – korvo. Oni laŭdas ilian fidelecon al gepatroj, ke ili manĝigas maljunajn gepatrojn buŝon al buŝo, tial do oni komparas ilin kun fidela Zeng-zi en la birda mondo. Ili antaŭdiras kiu venos viziti, aŭ peras la rendevuon de du steloj, Altairo kaj Vego, vicigante flugilojn sur Ĉielrivero=Lakta Vojo. Aŭ ili povas scii en la jarfino, kie fari sian neston, jam antaŭvidante, kia estos printempa vento. Sub neĝa matena aŭroro ili krias per malvarama voĉo kaj vespere ili revenas hejmen dormi, tio donas al talentaj poetoj inspiron kaj okazon pentri, por ke oni admiru ilian formon. Ili estas pli virtaj ol nuraj avaruloj.

Se oni kalkulas ciajn pekojn, tiam ĉe ci virto estas malpli ol malavantaĵo. Inter aliaj la korvo estas feroca laŭ karaktero, ĝi malestimas flugilojn de aglo kaj ne timas akrajn ungojn de akcipitro. Ĝia viando ne havas tian bonguston, kiel de ansero. Ĝia voĉo tute ne similas al pepado de najtingalo. Kiam ĝi krias, oni aŭguras al si iun malbonon, kaj nepre okazas ia malfeliĉaĵo, kaj oni ĉagreniĝas.

En vilaĝo ĝi formanĝas kaŝtanojn kaj persimonojn sur branĉoj, kaj en kampo ĝi damaĝas agrikulturan planton. Ĉu ĝi ne scias, kiel oni penas por akiri manĝaĵon? Ĝi iam prenas ovojn de pasero kaj manĝas ranojn de lago. Ĝi atendas kadavron de homo, voras intestaron de bovo kaj de ĉevalo. Legendo diras, ke finfine ĝi estus kaptita de sepio, aŭ ke, imitante kormoranon, ĝi dronus.

Kiu estas avida je koro, kiel ci, kaj kiu vestas sin nigre, tiun oni nomas fibonzo inter homoj. Budhistoj malamas lin, kaj laikoj lin tre malrespektas. Ve al ci! Estu atente diskreta! Por ke ci ne estu pafita per la sago de Yi, la ĉina pafarkisto, samekiel la ora korvo kun tri piedoj.

[Unua teksto estis verkita de Bontyou, sed Basyoo reverkis ĝin en 1690]